# La Aina — Lingvo de Jukaro

Kirikae-Hideo

13–a de septembro, 2012

En unu el ainaj epopeoj (jukaroj) dokumentitaj de Kindaiĉi Kjosuke (1882-1971), pioniro de aina lingvistiko, troviĝas rava strofo desegnanta cervojn, kiuj manĝas herbon en arbaro.

*Hanke-uk-pe*
*ko-kiraŭ-riki-*
*pumpa kane.*
*Tujma-uk-pe*
*ko-kiraŭ-ŝi-ka-*
*omare kane.*
Proksimaĵon prenantoj
por ĝi la kornarojn supren
levas.
Lontanaĵon prenantoj
por ĝi la kornarojn sur la dorsojn
metas.

Cervoj, kiuj manĝas proksiman herbon, klinas la kapojn sur la teron ĉe la hufoj, kaj tial la kornaroj staras. Cervoj, kiuj manĝas malproksiman herbon, streĉas la kolojn antaŭen, kaj tial la kornaroj kuŝas sur la dorsoj.

La aino estas gento, kiu konservadis karakteron de ĉaso-kolektada kulturo ĝis moderna tempo. Por ni, nuntempuloj, kiuj atingis etapon de "alte informita socio" tra tempo de agrikultura socio kaj tra industria revolucio, estas malfacile kompreni kaj ĝui ĝian buŝotradician literaturon, ĉar ni jam perdis kapablon apreci literaturon de antaŭ-agrikultura socio.

Jukaro estas tute malsama ol tio, kion ni prenas por fantazio, kaj ega diferenco troviĝas inter patosoj de jukaro kaj nia literaturo. Mi supozas, ke kompreni emocion de ainoj simpatie, kiuj ridis aŭ ploris pro deklamo de jukaro, estas preskaŭ neeble por japanoj.

La strofo prezentita supre estas do escepte facila por apreci. Ni povas fari klaran imagon el ĝi kaj ekteni ian kortuŝon. Unuvorte, ni povas tuŝi senton de iamaj ĉasistoj. Tamen plejparto de jukaro estas kontraŭracia kaj rifuzas aprecadon de nuntempuloj. Por ekzemplo, ni legu alian strofon. Bela fraŭlino venis de transmara lando. Ŝi estis tre bela, tamen portis apenaŭ videblan trajton de sklavo sur la nazo. Ŝi petis al mi (*Pojjaumpe*, heroo de la epopeo), ke mi savu de malamikoj ŝian mastrinon. Aŭdinte la peton, mi tuj prenis ŝin kaj ensaltis en maron kun ŝi. Mi kuris sur fundo de maro pli rapide ol trupo de fiŝoj. Survoje mi surakviĝis unufoje. La kapo de la fraŭlino malleviĝis. Kiam mi alvenis al la transmara lando, ŝi jam mortis droninte.

*Pirka pon menoko*
*retar ŝiknum-kan*
*i-j-e-sanke.*
*Ŝiknum-kaŝi*
*hure kemrit*
*e-ar-utasa.*
*Oan-raj keŭe*
*san-ota-kurka*
*a-ko-osura.*
La bela fraŭlino
blankajn okulglobojn
elmontris al mi.
Sur la okulgloboj
ruĝaj sangovazetoj
kuris en ĉiu direkto kaj kruciĝis.
Kadavron de la mortinta ino
sur sablan marbordon
mi forĵetis.

Mia sento ne povas akcepti la morton de la fraŭlino senkulpa, kiu estis ano de amika flanko, ol estis malamiko. Ĉu tio ne estas sensenca kaj kontraŭracia murdo? Mi abomenas la mikroskopan observon de la kadavro. Kiel terure! Kaj mi ne povas kompreni, kial tiel brutala kaj freneza la heroo estas. Sed jukaroj plenas je tiaj kontraŭraciaj, abomenindaj kaj teruraj kruelaĵoj. Trompo, kolero, forkuro, postkuro, lukto en aero, fendmortigo, rompmortigo, premmortigo ...

Lingvo de jukaro mem estas luksa kaj pompa same kiel ligna skulptaĵo aŭ brodaĵo de ainoj.

Skulptado kaj brodado estas klereco de viro kaj virino respektive, kaj manlerteco pri skulptado aŭ brodado estis rigardata kiel unu el virtoj, kiuj estis kondiĉoj, por ke oni estiĝu membro de elito en aina socio. Poluri lingvan teknikon estis ankaŭ rimedo por memkulturi. Estis estimata tiu, kiu havas lingvan kapablon. Malsame kiel japanoj, ainoj ne rigardis lingvon kiel necesan malbonon. Ankaŭ elokventeco estis unu el la virtoj. Tial la lingvo de jukaro evoluis altgraden kaj fariĝis luksa kaj kompleksa precipe en kampo de morfologio.

Ekzemple, por ĉiŭtaga diro:

> *pirka wakka san*
> pura akvo fluas,

oni kantas en jukaro:

> *pirka wakka*
> *ĉi-sana-san-ke.*

*san* 'iri malsupren laŭ rivero' kaj *sana* 'esti malsupre laŭ rivero' estas ambaŭ derivaj verboj de substantiva *sa* 'malsupra fluo'. Do *sana-san* 'iri malsupren laŭ rivero por esti malsupre laŭ rivero' estas redundanca (malkonciza) kunmetaĵo, kiu signifas same kiel simpla *san* signifas.

*ĉi-* estas prefikso por indifina persono nominativa, 'oni', kaj *-ke* estas kaŭzativa sufikso, '-ig-'. Do *ĉi-sana-san-ke* estas duoble redundanca: 'oni igas *ion* iri malsupren laŭ rivero por ke ĝi estu malsupre laŭ rivero'. Ĉi tiu luksa kaj pompa formo signifas tute same kiel simpla *san* signifas.

Cetere, mi interesiĝas en tiu punkto, ke ainoj trovis valoron en neĉiutagaj agadoj kiel skulptado kaj brodado kaj deklamo de jukaro. Aldonate al *teketok* 'manlerteco' kaj *paŭetok* 'elokventeco', unu alia virto, *rametok* 'kuraĝo', per kiu viroj ĉasis ursojn en montoj kaj glavofiŝojn en maro, estis same neĉiutaga virto. Ĉi tiuj virtoj estis ĉiuj preskaŭ vanaj por subteni realan vivon.

Oni ne uzis skulptaĵon kaj brodaĵon ĉiutage. Ili estis rezervitaj por festivalo, alivorte, por dioj. Lingvo de jukaro ne estis uzata en interparolado, sed en preĝo, nome, en mesaĝo al dioj. Ĉasadoj de ursoj kaj gravofiŝoj ne estis faritaj por vivteno. Male ili estis certaj sportoj aŭ ludoj, en kiuj oni riskis sian vivon kaj postulis meriton.

Ursoj kaj gravofiŝoj estis altrangaj dioj. Ĉasi ilin ne estis nura ĉasado, sed invitado. Ĉasistoj invitis ilin kiel gastojn al homa mondo. Fariĝi gastigantoj de la dioj estis plej honore en vivoj de ainoj. Cetere, kvankam proteino kaj graso estis prenitaj el cervoj kaj salmoj ĉefe, ili ne okupis rangon de dio, ĉar ili estis tro ĉiutagaj ĉasaĵoj.

Absorbiĝi al pliboniĝo de la tri virtoj estis tute senutile ekonomie. Tamen, supozeble, ainoj trejnis sin pri la virtoj pasie, ĉar tiuj virtoj estis necesaj por gajni favoron de dioj kaj respekton de homoj.

Sed insisto al la tradicia valoro kaŭzis malprosperon de la gento. Japanaj koloniistoj estis tute indiferentaj al la valoro de ainoj. Ili ne konsideris eĉ unu sekundon pri la strukturo de la aina socio. Kiam la socia valoro estis neglektata, kaj la virtoj de la elito sensignifiĝis en nova tempo, multaj ainoj el la gvidanta klaso perdis respekton kaj fieron, kaj samtempe la aina socio perdis kompetentajn gvidantojn. Mi kredas, ke tio estis nepreteratentebla kaŭzo de kliniĝo de la aino kontraŭ la japano.